

Pri zoologia kaj botanika nomenklaturaj.

C. Støp-Bowitz (N).

Estas necese ligi kelkajn komentariojn al la longa artikolo de D-ro De Smet pri la scienca nomo de la ĉimpanzo.

En la ĉiutaga lingvo oni bezonas nomojn de organismoj, plantoj kaj bestoj, kiujn la ordinaraj homoj konas, sed ekzistas amasego da organismoj, kiujn la ordinaraj homoj ne konas. Tamen la sciencistoj bezonas precizajn nomojn por ĉiuj organismoj, kaj kredeble ĉiuj civilizitaj homoj scias, ke por tiu celo ekzistas la tiel nomataj „latinaj nomoj”, pli bone oni nomu ilin „sciencaj nomoj”. La sistemon de la sciencaj nomoj ellaboris la sveda kuracisto Carl Linnæus, nobeligita kiel Carl von Linné, kiu ankaŭ latinigis sian nomon: Carolus Linnaeus (1707-1778), kiu fariĝis profesoro pri naturscienco.

La nomenklatura sistemo de Linné estas tiom genia, kiom ĝi estas simpla. Li donis nomon, plej ofte latinan substantivon, ne al ĉiu specio, sed al la genro, kaj aldonis unu vorton, plej ofte latinan adjektivon, al ĉiu specio, kiu apartenis al tiu genro. Hodiaŭ la sistemo de Linné estas akceptita kaj uzata de sciencistoj en la tuta mondo. Kompreneble okazas en la nomdonado eraroj, kiujn oni devas korekti, sed iom post iom la nomsistemo fariĝas stabila kaj pli aŭ malpli perfekta en la organismogrupoj bone tralaboritaj. La ĉefa problemoj estas nur ke modernaj homoj preskaŭ ne plu scias latinon. Latino estas ne nur gramatike komplikita lingvo, ĝi estas ankaŭ ne tre elasta, kaj jam en la antikva tempo ĝi alprenis multajn grekajn vortojn; la greka lingvo estis multe pli elasta, kaj oni evoluigis sistemon de latinigo de fremdvortoj grekaj kaj ankaŭ alilingvaj. Hodiaŭ la junaj sciencistoj ĝenerale ne komprenas la signifojn de la vortoj, kiuj fariĝis nuraj simboloj aŭ etiketoj, sed ankaŭ kiel tiaj ili funkcias. La ĉefa problemoj estas eviti gramatikajn erarojn, ekz. okaze de derivado, kaj plifaciligi prononcadon.

La nomenklatura sistemo de Linné estas hodiaŭ akceptita kaj praktikata de la zoologoj kaj botanikistoj ĉie en la mondo. Inter la centmiloj aŭ milionoj da nomoj laŭregule donitaj kaj donataj al organismoj neeviteble kelkaj estas malbone elektitaj, kio ne estas kaŭzo por kondamni la tutan sistemon. Por sia kritiko De Smet elektis aparte komplikitan ekzemplon, tiun de la scienca nomo de la ĉimpanzo, kaj surbaze de tiaj ekzemploj li volas kondamni kaj forjeti la tutan nomsistemon, kiun uzas hodiaŭ ĉiuj sciencistoj pri biologio, kaj enkonduki novajn nomojn por ĉiuj organismoj. Li eĉ volas forigi la koncepton de genro, kiu formas la bazan ideon de Linné, kaj li kreis kun kelkaj amikoj apartan Asocion por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturaj. La praktikado de tia nomsistemo farus neutiligebla la tutan

ĝisnunan sciencajn literaturon de la zoologio kaj botaniko! Kaj la fakto, ke li uzas Esperanton por sia kampanjo kontraŭ la internaciaj nomenklaturaj, povas nur kompromiti nian lingvon.

Aliflanke la fakto ke la hodiaŭaj biologoj, kaj precipe la junaj, tre malmulte aŭ neniom scias la Latinan lingvon, kaŭzas problemojn por la senerara uzado de la latinformaj organismonomoj. En 1988 la Normiga Sekcio de Terminologia Esperanto-Centro (TEC) starigis komisionon pri botaniko kaj zoologio, kies gvidanto mi fariĝis. Tiu komisiono, konsistanta el 14 biologoj, profesiaj kaj amatoraj, ellaboris sistemon, laŭ kiu oni facile povas formi Esperanto-versiojn de la sciencaj latinformaj organismonomoj. Oni do tute ne ŝanĝas la nomenklaturan sistemon kaj la nomojn, sed nur kreas iliajn esperantajn ekvivalentojn kaj proponas en la Regularoj (Kodoj) nur la ŝanĝojn necesajn por la transiro de la latino al Esperanto. 16-paĝa kajero pri ĉi tiuj proponoj, kun ekzemploj, estas eldonita de TEC en 1994.

D-ro philos. C. Støp-Bowitz,
Orda profesoro ĉe AIS.
Camilla Colletts vei 3,
N-0258 Oslo, Norvegujo.